GAZZETTA DI PARMA | Venerdì 25 Ottobre. 2013 PAG. 11

UNIVERSITÀ' AL NEOLAUREATO IL RICONOSCIMENTO«Giorgio Canuto»

# La sfida dell'esperanto: premio alla tesi di Simone Mattiola

**Beppe Facchini**

Il Unire tutte le popolazioni del mondo attraverso la parola. Era il sogno di Ludwik Lejzer Zamenhof, medico polacco che iniziò la lingua internazionale «esperanto» nella seconda metà dell'Ottocento, e di Giorgio Canuto, docente di Medicina legale e rettore dell'Università di Parma dal 1950 al 1956, che all'ambizioso progetto di Zamenhof dedicò oltre trent'anni di studi e ricerche, diventandone, di fatto, uno dei più illustri precursori nel nostro Paese.


PREMIO KANUTO La instruistino Luigia Oberrauch Madella kaj Simone Mattiola

Proprio per queste ragioni, dal 2010, l'ateneo cittadino dedica a Giorgio Canuto un premio di laurea riconosciuto agli studenti di tutta Italia che, attraverso il proprio lavoro di tesi, sottolineano l'importanza della democrazia linguistica mondiale, intesa sia come necessità di superare le difficoltà comunicative tra un popolo e l'altro, sia come conservazione delle minoranze presenti in ogni angolo del pianeta.

Ponendo le basi per un sistema in grado di salvaguardare il ladino, lingua parlata attualmente da 30 mila persone soprattutto in Trentino, si è pertanto aggiudicato la quarta edizione del Premio Canuto il 24-enne originario di Lecco Simone Mattiola, studente dell'Università di Torino che ieri, nel plesso D'Azeglio del nostro ateneo, ha ricevuto l'importante riconoscimento direttamente dalle mani di Luigia Oberrauch Madella, presidente dell'Associazione Esperanto «G. Canuto» di Parma.

Grazie alle sue circa duecento pagine di elaborato, il giovane Simone adesso avrà la possibilità di scrivere un articolo scientifico su «InKoj», una rivista specializzata in filosofia e lingue artificiali. «Avere un'opportunità di questo genere, rappresenta una grande occasione per il mio futuro professionale» ha confessato il neodottore lombardo, il quale ha discusso la tesi premiata appena una settimana fa, avvalendosi di un relatore di tutto rispetto in ambito interlinguistico: Gabriele Iannàccaro, ordinario alla «Bicocca» di Milano e ospite della cerimonia di ieri, conclusa con una sua lectio magistralis sull'ecologia linguistica.

Ad ascoltarlo, c'erano anche il professor Davide Astori, docente di Linguistica in via D'Azeglio e vero «motore» del Premio Canuto, e Sandro Cavirani, prorettore per i rapporti internazionali

UNIVERSITATO AL LA NOVDOKTORO LA PREMIO «ĜORĜO KANUTO»

# La defio de Esperanto. Premiita la disertacio de Simone Mattiola

**Beppe Facchini**



PREMIO KANUTO La instruistino Luigia Oberrauch Madella kaj Simone Mattiola

Kunligi ĉiujn popolojn de la mondo pere de la vorto. Estis la revo de Lejzer Ludwik Zamenhof, pola kuracisto kiu iniciatis la internacian lingvon «esperanto» en la dua duono de la oka jarcento, kaj de Ĝorĝo Kanuto (itale: Giorgo Canuto), docento pri jura Medicino kaj rektoro de la Universitato de Parmo de 1950 ĝis 1956, kiu al la ambicia projekto de Zamenhof dediĉis pli ol tridek jarojn da studoj kaj esploroj, iĝinte, fakte, unu el ĝiaj plej eminentaj pioniroj en nia lando.

Ĝuste pro tio, ekde 2010, la urba universitato dediĉas al Ĝorĝo Kanuto doktorecan premion agnoskitan al studentoj de tuta Italio, kiuj, per sia disertacia verko, emfazas la gravecon de la lingva demokratio tutmonda, komprenata kaj kiel neceso superi la komunikajn malfacilaĵojn inter unu popolo kaj la alia, kaj kiel konservado de la minoritatoj ĉeestantaj en ĉiu angulo de la planedo.

Metinte la bazojn per sistemo kapabla defendi la ladinan, lingvon nuntempe parolatan de 30.000 homoj ĉefe en Trentlando, akiris la venkon de la kvara fojo de la Premio Kanuto la 24-jaraĝa junulo el Lecco, Simone Mattiola, studento ĉe la Universitato de Torino kiu hieraŭ, en aŭlo de strato D'Azeglio de nia universitato, ricevis la gravan premion el la manoj de s-ino Luigia Oberrauch Madella, prezidantino de la Asocio-Esperanto « Ĝ.Kanuto" de Parmo.

Dank'al lia ducentpaĝa laboro, la juna Simone nun havos la rajton verki sciencan artikolon por "Inkoj", faka revuo pri filozofio kaj planlingvoj. «Havi oportunecon tian, reprezentas grandan ŝancon por mia estonta profesio» konfesis la lombarda novdoktoro, kiu pridiskutis la premiitan tezon ĝuste antaŭ unu semajno, kun akademiano ege respektata ene de la interlingvistika medio: Gabriele Iannàccaro, titola profesoro en "Bicocca" de Milano kaj gasto de la hieraŭa ceremonio, kiun li finis per sia *lectio magistralis* pri la lingva ekologio.

Ĉeestis, aŭskultante lin atente, ankaŭ profesoro Davide Astori, docento pri Lingvistiko en strato D'Azeglio kaj vera «motoro» de la Premio Kanuto, kaj Sandro Kavirani, vicrektoro komisiita pri la internaciaj rilatoj.